

1



BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA
ESPERANTISTA ASOCIO

JANUARO 1962

E N H A V O

	Paĝo
* * * La balotoj	1
Violin Oljanov. Kia societo estas bona?	2
Nikola Nikolov. La Esperanto-libroj atingu la legantojn	4
Boris Kavalĝiev, S. Izmajlov, Georgo Deŝkin. Versaĵoj	5
Dimo Trudoljubov. En la novjara nokto	6
Ada. Melpomena frapetis (rememoro)	9
Atanas D. Atanasov. La prepozicioj en Esperanto	11
* * * Rezultoj de la dua etapo de la organiza konkurado 1961/1962	13
* * * Fonduso „Esperanto-Domo en Sofio“	14
* * * Junularo sur posteno	15
* * * Parolo de la redakcio	16



V. 19479

*Abonkotizo : jara — 1,4 levoj, duonjara — 0,7 lv. Por eksterlando — 2 lv,
2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSR, Hungario, Jugoslavio,
Pollando kaj Rumanio — 1,8 lv.*

*Reklamtarifoj : 0,5 levoj por cm²; korespondanconoj : 5 stotinkoj por ĉiu
vorto. Eksterlandaj adresoj publikigataj senpage. Ekstera kovrilpaĝo — 100 lv.*

LANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANIO: Ing. Cefo Fico, 44 Rruga Stafa, Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, via A. Boito 6, Padova

KOREO: Korea Esp. Asocio. Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23 Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, Bucureşti 5

SOVETUNIO: Jvan Palkin, Mitnaja ul. 52/54 kv. 19, Moskva, B—162

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109—a.



L A B A L O T O J

La 25-an de februaro j. k. okazos balotoj por la Kvara Parlamento de Popola Respubliko Bulgario, por popolaj konsilantaroj kaj por juĝistoj kaj asesoroj. La balotoj okazos en kondiĉoj de granda laborentuziasmo por la plenumo kaj superplenumo de la ekonomia plano de 1962, por efektiva de la politiko por akcelita socialisma konstruado.

La balotoj okazos en tre grava momento de la disvolviĝo de nia lando kaj de la internacia situacio post la historia XXII Kongreso de la glora Komunista Partio de Sovetunio. La unuanima aprobo kaj la amasa laborentuziasmo, kun kiuj la laboruloj renkontis la brilan programon kaj la decidojn de la Kongreso de KPSU, kiel ankaŭ la decidojn de la Novembra Plenkunsido de la Centra Komitato de la Bulgara Komunista Partio, estas nova elokventa manifestacio de la fortikigita moralpolitika unueco de nia popolo. La senĉese kreskantaj fortoj de la socialisma mondo kaj de la paco baras la vojon de la milito.

En nia lando la balotoj okazos sur la fundamentoj de balotsistemo garantianta ĝeneralan, egalan kaj rektan elektorrajton, kun sekreta voĉdonado. Rajtas voĉdoni ĉiuj enloĝantoj, finintaj sian 18-jaran aĝon, sendepende de siaj raso kaj nacieco, religia konfeso, de sia klereco kaj socia aparteno, deveno ktp. En Bulgario ekzistas neniam limigoj kaj privilegioj. En multaj burĝ-kapitalismaj landoj la laboruloj ofte ne havas elektorrajtojn, ekzistas diversaj limigoj, policteroro kaj falsado de la voĉdonoj.

Alia fakto parolanta pri la demokratieco de nia balotsistemo estas tiu, ke la balotojn preparas kaj efektivas la loĝantoj mem per elektitaj, de ili balotkomisionoj.

Kune kun ĉiuj bulgaraj laboruloj en la preparo partoprenas (kaj plej aktive devas partopreni) ankaŭ la bulgaraj esperantistoj. Plej supera devo de ĉiu esperantisto estas envicigi sin en la antaŭbalotaj laboroj kaj agitado, por ke la balotago — la 25-a de februaro — transformiĝu en solenan feston de nia socialisma demokratio. Samtempe per sia internacia korespondado kaj ligoj la esperantistoj devas konigi al la eksterlandanoj la demokratian sistemon de nia balotleĝo, la grandegajn sukcesojn de nia popolo en la konstruado de la socialismo, konigi al la fremdlandanoj la sopirojn de la bulgara popolo pri tutmonda paco kaj paca konekzistado inter la landoj kun diversaj socisistemoj.

Dum la lastaj jaroj nia Esperanta-movado registris multajn sukcesojn. Pri ili ni parolis multfoje. Ilin sentas kaj rimarkas ne nur la esperantistoj, sed ankaŭ flanke starantaj homoj, la enlanda socia aktivularo. Sed ni ne devas trofieri. Iuj gekamaradoj trumpetas ĉie, ke la bulgara Esperanto-movado estas la plej forta kaj per tia naŭva „propagando“ malutilas al la movado. Fakte en nia agado, en la agado de la societoj, estas ankoraŭ multaj mankoj, kun kiuj ni devas sisteme batali por antaŭenigi la movadon sur glataj kaj solidaj reloj.

Tre malmulte estas ankoraŭ la bonaj societoj en la lando. Tre malmulte el ili povas memstare, meminitate agi. Simptoma estas la fakto, ke ne pli ol 15% el la societoj plenumas sian elementan kaj plej simplan devon — pagi al la asocio regule, laŭ trimonatoj la membro-kotizon. Eĉ tia societo kia „Dimitrovec“ en Ruse, kiu tre fanfaronis kaj bruemas, ĝis la fino de la jaro pagis nenian kotizon. Ĉe tia konduto, ĉu ni povus konfidi al tiaj societoj aliajn, pli seriozajn taskojn?

Kiajn societojn ni povus konsideri bonaj, seriozaj organizaĵoj, kiuj povus servi kiel solida fundamento de la asocio?

1. Kiel ni ĵus menciis, la unua grava signo pri bona organizaĵo estas la regula enkasigo de la membro-kotizo. Delonge CK starigis la trimonatan pagon kaj la praktiko jam montris, ke tiu maniero estas la plej oportuna kiel por la membroj, tiel ankaŭ por la societoj. La pasintan jaron ni enkondukis la tre simplajn raportilojn, kiuj devas akompani la sendatajn al la asocio kotizsumojn, kaj kiuj prezentas ĉiam tre klaran bildon de la organiza stato de ĉiu ajn societo. Malgraŭ ĉiuj ĉi evidentaj avantaĝoj multaj societoj neglektas tiun manieron de kotizado kaj per tio malhelpas la laboron de la asocio.

2. La nombro de la abonintoj de ĉiu societo ankaŭ estas grava indekso pri ties seriozezo, pri bona kompreno de la taskoj. Delonge estas konate, ke ne povas ekzisti serioza movado sen presorgano. Ĝi estas la plej efika propagandanto kaj organizanto. Sed nur eldonado ne sufiĉas, estas necese, ke la gazeto estu ricevata kaj legata de ĉiuj esperantistoj. Sed en tiu sektoro de nia aktiveco ni havas plej multe da mankoj. Ankoraŭ ekzistas estraranoj de societoj, kiuj malgraŭ la multaj avertoj, ne ricevas kaj ne legas nian organon. Nur tiumaniere oni povas klarigi la fakton, ke la kasisto de la societo en Burgas (kaj ne nur li) sendas por duonjara abono de BE 6 levojn (malnovajn), malgraŭ ke jarojn jam estas subtrekate en BE, ke la duonjara abono kostas ĉiam 7 levojn; nur tio povas klarigi la fakton, ke multaj societoj ne scipovas plenigi regule la simplajn trimonatajn raportilojn pri la membrokotizo, kion ni klarigis kelkfoje sur la paĝoj de BE, nur per la neglegado de BE oni povas klarigi la fakton, ke ĉiutage estas ricevataj en la kancelario de la asocio plej diversaj kaj samtempe tre ordinaraj demandoj, ne unufoje traktataj en BE, kaj eĉ la aŭtoroj de tiuj demandoj koleras kaj pretas insulti, se ili ne ricevas ĝustatempe la respondon. Efektiva esperantisto, bone informita pri la movado en- kaj eksterlande povas esti nur tiu, kiu regule kaj atente legas nian presorganon.

Nia gvidslogano dum la kuranta jaro estu; Eĉ ne unu asociano sen „Bulgara Esperantisto“!

Memkompreneble la estraroj devas pridiskuti en kunsidoj la ĉefartikolojn kaj la pli gravajn organizaĵajn demandojn, starigitajn en la gazeto. Iujn el ili oni devas legi kaj klarigi ankaŭ en ĝeneralaj kunvenoj.

3. Ĉiu organizaĵo, prenante de la membroj, devas kompensi. La homoj membras en niaj societoj por lerni la lingvon. Jen pro kio estas necesaj la regulaj ĉiusemajnaj renkontiĝoj. En ili povas efektiviĝi ankaŭ la kultur-kleriga laboro. Tiuj regulaj kunvenoj stabiligas la organizaĵan staton de la societoj, aligas firme la membrojn al la societo. Se la societo ne posedas propran klubojn ĝi povas utiligi lernejan ĉambron, legejon, ĉambron en kultura domo, klubojn de la Patrolanda Fronto, de turisma organizaĵo, de Komitato por Bulgara-Soveta Amikeco ktp.

4. La internacia korespondado estas la unua kaj plej amasa apliko de la scio de la internacia lingvo. Jen pro kio al tiu amasa esperantista aktiveco la societaj estraroj devas apartigi pli grandan atenton. Ĝi ne devas esti memcela, nur por distro, sed la leteroj devas esti saturitaj per utila enhavo. Pro tio oni devas organizi letervesperojn, raportojn pri la temaro kaj la maniero de korespondado, aranĝi ekspoziciojn de leteroj ktp. La estraroj devas fari statistikon de la korespondantoj kaj la korespondadojn kiel ankaŭ de la temaro kaj helpi la novajn kaj nespertajn esperantistojn, kiuj ne havas ankoraŭ la kutimon korespondi.

5. Por ke la esperantistoj kaj ties organizaĵoj ne estu rigardataj kiel ia anakronismo, kiel stranguloj-utopiistoj, ili devas vivi kaj labori en harmonio kun la nuntempaj taskoj de nia socio, kun la zorgoj, la ĝojoj kaj la laboro de nia popolo. La partopreno en tutpopolaj kampanjoj, brigaĵoj kaj aliaj sociaj aktivecoj nur pligrandigas nian aŭtoritaton, plivastigas kaj plisolidigas nian lokon en la socio.

Nun ekzemple ni troviĝas en la plej arda periodo de la porbalota kampanjo. La balotoj estas grava momento en la vivo de la popolo. Per ili ĝi efektivigas siajn demokratiajn rajtojn pri la regado de la lando, de la urboj kaj de la vilaĝoj, sian partoprenon en la laboro de la juĝoj. Sed ĉu ĉiuj societoj, ĉiuj esperantistoj aliĝis al tiu tutpopola aktiveco? Ĉu ni partoprenas en la laboro de la balotkomisionoj, de la agitantaro, ĉu ni kontribuas por la bona marŝo de la preparaj laboroj? Ĉiu societo devas dediĉi unu kunvenon al la balotoj kun raporto pri ties signifo, pri nia demokratia balotsistemo kaj pri nia loko kaj partopreno en la balota kampanjo.

6. La propagando ne devus limiĝi nur en la kadroj de la propaganda semajno. Ĝi devas esti konstanta: ekspozicioj, vitrinoj, brigadoj, publikaj paroladoj, partopreno kun aliaj organizaĵoj en sociaj aktivecoj — ĉio ĉi prezentas bonegan propagandon. En tio ni devas vaste utiligi la internacian korespondadon. Ofte niaj aktivuloj plendas, ke la lokaj ĵurnaloj ne publikigas iliajn propagandajn artikolojn. Sed la redakcioj certe volonte akceptus interesan korespondadon de Kubo, Brazilo, Sovetunio, Afriko, Ĉinio, Vjetnamio. . . Kaj kiom da tiaj materialoj restas ĉe la esperantistoj neutiligataj. Kian abundon da interesaj informoj disponigas al ni tiel la leteroj, kiel ankaŭ la Esperanto-gazetoj! La publikigo de tiaj materialoj ja estas nekompareble pli efika propagando ol la teoriaj traktatoj. La rekta monro de la praktika utiligo de la lingvo iras senpere al la koro kaj la menso de la homoj kaj multe pli facile konvinkas ilin. Disponigu, gekamaradoj, interesajn eltiraĵojn el viaj leteroj aŭ tradukaĵojn el la Esperantaj gazetoj al la lokaj gazetoj kaj radio-stacioj kaj via laboro ne restos sen rezulto.

7. *Sajnas, ne estas necese memori pri la devo de la societoj malfermi ĉiujare kursojn por lerno de la lingvo. Tio kun ne multaj esceptoj, estas farata. Ja tio estas nia fonto por novaj membroj kaj aktivuloj, por kresko de nia movado. Ili devas esti malfermataj en severe difinita tempo ĉiujare, antaŭata de propaganda semajno. La praktiko montris, ke la aŭtunaj kursoj estas pli rezultodonaj, ol la printempaj. Ni devas orientiĝi al pli longdaŭraj kursoj, dufoje semajne, kiuj donus al la gekursanoj solidan bazon por plua memstara laboro.*

8. *Ju pli konataj estas inter si la membroj de iu ajn organizaĵo, ju pli varia estas ties vivo, des pli volonte ili oferas sian tempon, energion kaj scipovon. Pri tio, pri la intimiĝo de la gesocietanoj, pri ilia entuziasmiĝo tre efikas la ekskursoj, amuzvesperoj, gajaj junularaj kunvenoj, intersocietaj renkontiĝoj ktp.*

9. *Tian vastan kaj diversflankan agadon la estraro ne povas plenumi sola, sen la helpo de granda aktivularo. Por tiu celo krom la komisionoj ĉe la kulturkleriga kaj la propaganda-kursa fakoj la estraro devas krei grupojn kun grupestroj, dividante la membraron po 10—15 laŭ loĝ- aŭ laborloko. Tiuj grupestroj estas la konstanta kaj fundamenta aktivularo kaj ili efektivegigas la konstantan interligon inter la estraro kaj la anaro. Ili kolektas la membro-kotizon, varbos abonantojn, disvastigos la decidojn de la estraro ktp. Tia sistemo donas plej rapidajn rezultojn por la plivigligo de la societo.*

Kompreneble ĉiu societo en sia agado trovos novajn kaj novajn formojn de agado, ĝi ĉiam plivariĝos. Sed la sintezitaj supre aktivecoj almenaŭ por la nuna stadio de disvolviĝo de nia movado, por niaj enlandaj kondiĉoj, estas la fundamentaj kaj se la estraroj gvidos la societan laboron laŭ ili, ĝi nepre havos efektivajn rezultojn, kaj ni plenrajte povos ĝin konsideri bona societo.

Violin Oljanov — Sekretario de BEA

LA ESPERANTO-LIBROJ ATINGU LA LEGANTOJN

Multe da E-societoj en nia lando jam havas bibliotekojn. La plimulto de la bibliotekistoj kaj la societaj estraroj bone komprenas la rolon de la E-bibliotekoj kaj penas aĉeti ĉiujn librojn, kiuj estas haveblaj en nia lando. Ili ankaŭ serĉas manieron liveri valorajn Esperanto-verkojn el eksterlando, kiujn pro valutaj kaŭzoj Bulgara Esperantista Kooperativo ne povas importi.

La bona funkciado de la bibliotekoj de niaj E-societoj dependas multe de la elektataj bibliotekistoj. Ne sufiĉas nur la bona konservado de la libroj

kaj ilia disdono al legemaj membroj. Devo de niaj bibliotekistoj estas alkitimigi ĉiujn anojn de niaj societoj legadi E-librojn. Tion oni povas fari per individua diskutado kun la anoj, helpo en la elektado de konvena legaĵo, konsiderante la lingvan kaj la kulturalan nivelon de la anoj. De tempo al tempo la bibliotekistoj devas aranĝi vesperojn de la E-libro. En tiuj vesperoj oni skizis la enhavon de unu aŭ du libroj de la societa biblioteko, kaj legu interesajn fragmentojn el ili.

Ĉiu esperantisto devas havi E-fakon

***Daŭrigu la kampanjon por varbado
de abonantoj!***



NOVJARA SALUTO

Plej ŝatata mia rev-donaco,
kiun dum Novjaro ni atendas,
estas certe la tutmonda paco,
sed de kio ĝi do nun dependas?

Por ke longe oni ne atendu,
ni fervore devas ĝin defendi
kaj batali kun efikaj agoj,
kun aŭdaco dum novjaraj tagoj.

Tiel la popoloj en konsento
kaj per vera amikeca sento,
sen terura atoma minaco
kreos sur la tero daŭran pacon.

Jen pro kio ni defendu ĉiam,
diskonigu per parol' kaj faro
pacproponojn de Sovetunio
por feliĉ' kaj bono de l'homaro.

Boris Kavalĝiev

en sia hejma biblioteko. Aĉetante E-li-
brojn ni helpas la eldonadon de novaj
verkoj kaj ĉiam havus je dispono la
plej necesajn librojn. Krom tio, paro-
lante kun niaj gastoj pri Esperanto, ni
povus montri al ili parton de la libro-
trezoro de Esperanto.

Ni obstine laboru por disvastigo de
la esperantaj libroj.

Nik. Nikolov

CK de BEA kaj la redakcio de
BE dankas al ĉiuj, kiuj gratulis
ilin okaze de la nova jaro.
Ni deziras al niaj legantoj,
aktivuloj kaj kunlaborantoj fe-
liĉon kaj sukcesojn en la
Esperanto-laboro!

GLORAJ KVAR JAROJ

Nia kosma konkero — nur kvarjara infano,
tamen ĝin ne superas okcidentaj sinjoroj.
En komenco — sputniko 83-kilograma,
nun — 5-tunaj kosmŝipoj kun ŝipestroj-
majoroj!

Portis niaj raketoj sovetŝildon al luno,
fotografis lunflankon, ĝis tiam sekretan.
Sekvos flugo de homoj sur lunon. —

Sendube,
mondo dankos por tio ree Landon Sovetan.

Georgo Deŝkin

N. M. Jazikov

KANTO

El la fora, fora lando,
de l'rivero Volgo granda
por labor' en harmoni',
por libero inspiranta
kunvenintaj estas ni.

Ni memoras pri kamparo,
pri herbejoj, pri montaro,
kaj en nova lando nun
pri la hejmo nia kara,
ni toastas en komun'.

En komenco kaj en lasto
por popolo la toasto,
por justeco, pri la ver',
por la sankta vok': liber',
liber', liber'!

1827 El rusa lingvo tradukis:
S. Izmajlov

EN LA NOVJARA NOKTO

(Rakonto)

Antaŭ ok jaroj en la familio de la instruisto Boris Ganev okazis malkonkordo. Kiamaniere eniris la vermo de la familia putro en la animon de Borls — ankaŭ li mem ne jam komprenis. Kaj baldaŭ, antaŭ la disigo de la geedzoj, al ili naskiĝis infano — knabino, kiun ili baptis Cveta.

Ganev instruis kelkajn jarojn en diversaj provincaj urboj, sed poste li sukcesis translokiĝi en iun ĉefurban gimnazion. Irina — lia edzino, same instruistino, restis en sia naskiĝurbo, detenante la infanon ĉe si. Ŝi daŭrigis instrui en la loka gimnazio.

Dum tiuj jaroj Ganev ekvivis gaje kaj senzorge. Preskaŭ la tuta salajro, kiun li ricevis, li elspezis por kontentigi siajn bezonojn. En Sofio li amikiĝis kun maljunaj fraŭloj, kun disedziĝintaj kiel li viroj kaj vespere li vagis ĝis malfrue en restoracioj kaj dolĉaĵejoj. Nur de tempo al tempo li rememoris, ke li forlasis edzinon kaj infanon.

Irina tre malfacile travivis la disiĝon. De babilema kaj gaja, ŝi farigis silenta — horojn ŝi restis apud la fenestro, fiksinta rigardon al la ĉefurbo, kaj pensis, pensadis. . . Distriĝon ŝi trovis nur en la gimnazio, inter la ĝelernantoj, kien ŝi denove farigis la estinta parolema Irina.

Sed revininte hejmen, ŝi denove komencis malĝoji. Ofte en tiuj momentoj la juna virino prenis la violonon kaj ĝis malfrue ludis mallaŭte, surdigite. Per la minora muziko Irina distris la ĉagrenon de sia animo, ĉagrenon de unu ruinigita revo. Unu sektoro de ŝia hararo rapide argentiĝis.

Poste, post jaroj, Irina ŝajne alkutimiĝis al la persona malfeliĉo. Por tio kontribuis plejparte ŝia infano Cveta kaj la ĝeinstruista kolektivo en la gimnazio. Ili distris ŝiajn turmentajn pensojn. Irina fordonis sian tutan animon,

saĝon kaj sciojn al la laboro, de la infanoj, kiujn ŝi edukis, ŝi volis krei konsciajn homojn, kun nova rilato al la familio.

Tamen kun Boris okazis inverse. Post la unuaj kelkaj jaroj de senzorga vivo, ĉe li pli kaj pli ofte komencis aperi pensoj de pento. . . Li sentis, ke li marŝos sur glitvojo, ke li iros al abismo. . . Iuj liaj amikoj edziĝis kaj forlasis lin. Li ofte restis sola en sia loĝejo, pensis pri siaj agmanieroj, pri sia tuta reciproka vivo kun Irina kaj komprenis, ke li eraris.

* * *

Sabate Ganev revenis hejmen pli frue. Sur la tablo li trovis leteron. Unu amiko el la urbo de lia edzino, same instruisto, skribis al li. Kaj interalie li sciigis lin, ke antaŭ nelonge en unu koncerto de amatoroj Irina kun granda majstreco plenumis violonajn fragmentojn de Mocart kaj Ĉajkovski. Ganev legis tiujn vicojn kaj en lia imago elkreskis la vizaĝo de iama amata de li virino. Nun li denove rememoris ĉiun faldon desur ŝia vizaĝo, la brilo de ŝiaj fiksitaĵ kun varmecon kaj amo nigraj okuloj.

Ganev nerve disŝiris la leteron kaj forĵetis ĝin en la fornon, ŝajne per tio li volis interrompi la torenton de nedezirataj pensoj.

. . . Kiam posttagmeze li ekiris al la domo de unu lia amiko, sur la strato Boris vidis ŝarĝaŭtomobilon, ŝargita per novjaraj pinarbetoj. En tiu momento doloriga tremo pikis lian korpon. La homoj denove kolektiĝos kontraŭ nova jaro, sidos ĉirkaŭ la mangotablo paroli gaje, doni donacojn al siaj infanoj. . . Kaj li? . . . Ankaŭ en tiu ĉi jaro en la animo estos denove dezerte kaj malplene. Ankaŭ en tiu ĉi jaro li ne eksentos la varmecon de la familia fajrulo.



* * *

Ju pli alproksimiĝis la nova jaro, des pli en la animo de Ganev pliigis la eksterordinara maltrankvilo. Li intence drinkis pli ol ordinare, serĉis gajajn kompaniojn, sed se li iam hazarde preterpasis iun domon kaj ekrigardis en ĝi iun ornamitan pinarbeton, tuj li klinis kapon kaj en lia brusto ekbolis io.

En la lasta tago de la malnova jaro Boris Ganev dormis ĝis malfrue. Poste li starigis, malfermis la fenestron kaj ekrigardis eksteren. Ĉifonitaj nuboj naĝis malsupren, preskaŭ super la kamentuboj de la ĉefurbaj konstruaĵoj. Vitoŝa estis kovrita per dika neĝo. Blovis malforta okcidenta venteto. Boris streĉis manon. . . La neĝeroj, kiel disŝutita pomarba floro, ŝanceliĝante ĉirkaŭflugis en la aeron kaj surfalis sur lian manplaton. Li iom da tempo staris tie, poste li vestis sin, kaj ekmarŝis al la dolĉaĵejo „Praga“, kie li ordinare renkontiĝis kun amikoj.

Sur bulvardo „Georgi Dimitrov“ Ganev tute hazarde ekmarŝis post unu juna virino, kiu enmane kondukis kvin-ses jaran knabineton. La infano vidis en la vitrino de unu magazeno bele ornamitan pinarbeton kaj ekmurmuris:

— Panjo, ĉu ni havos pinarbeton?

— Jes, ni havos. . . Ankaŭ ni havos. . . Mallaŭte respondis la patri-no—Kiel ankaŭ dum la pasinta jaro. . .

— La patro de Borjanka antaŭhier-aŭ aĉetis pinarbeton. . . Se mi havus paĉjon, ĉu li aĉetus al mi pinarbeton, panjo?

Tiuj vortoj de la nekonata infano frapis Boris Ganev rekte en la koron. Li ne deflankiĝis en la dolĉaĵejo „Praga“, sed daŭris marŝi sur la trotuaro—sendirekte. En li jam malklare formiĝis apenaŭ rimarkebla fatale decido. . .

* * *

En la provinca urbo Ganev alvenis en la unuaj horoj de la nokto. Sur la

trotuaroj kaj sur la platoj de la stratoj estis lume kiel tage. Falis blanka, mola neĝo. La domoj, stratoj, placoj—ĉio estis kovrita per dika neĝa kovrilo.

Ganev marŝis malrapide kaj en lia koro enfluis la ĝojo de la proksimeco de io parenca kaj kara. Liaj piedoj droniĝis en la profunda neĝo. Li atingis la domon de sia edzino kaj haltis ĉe la barilo. La fenestroj de ĉiuj ĉambroj lumis. En la antaŭĉambro estis videbla novjara pinarbeto. Aperas konata virina figuro. En la brusto de Ganev ekbolis varmega ondo. Lia koro ekbatis rapide. Li ekspiris profunde kaj peze.

Baldaŭ el unu iom malfermita fenestro aperadis mallaŭtaj, konataj kaj karaj sonoj. Irina ludis „la kanton de Solvejg“. Preskaŭ ĉesinte spiri Ganev enpensiginta aŭskultis la mildan muzikon de Grig. Li ne rimarkis la homojn, kiuj preterpasis kaj mirante fiksrigardis lin.

Irina ĉesis ludi. Ĉirkaŭ la domo denove ekestis silento. En tiu momento Ganev ankoraŭ pli forte eksentis sian solecon. Li decidis eniri. Li malfermis la pordegon, supreniris la placeton kaj ĝene eksonis. Oni aŭdis bruon de malfermo de pordo kaj rapidajn paŝojn.

— Panjo, avo frosto! Avo frosto!

La pordo malfermiĝis kaj antaŭ Ganev ekstaris emocie blonda knabineto. Ekvidinte la nekonatan homon en ŝiaj brilaj infanaj okuloj ekestis disrevido. En tiu ĉi momento malantaŭ la infano ekstaris Irina. Ŝia vizago paliĝis. Ŝi renkontis la ekrigardon de Boris, sed ne ekparolis. Kaj li silentis konfuzite, ŝajne ne sciis kion diri. . . Liaj paliĝintaj lipoj apenaŭ ekgemis:

— Irina. . . mi estas kulpa. . . mi scias. . .

Irina rigardadis la surŝutitan per neĝo homon kaj en ŝiaj okuloj miksiĝis flametoj de turmento, malamo kaj indiferenteco. Ŝi kliniĝis super la infano, ekkaresis ĝin sur la blondaj bukloj kja diris:

La Prepozicioj en Esperanto

Kvara Leciono

AL — Mi venas al vi. Mi donas al ŝi. Li parolas al ili. Ili deziras al vi bonan tagon. Tio plaĉas al mi. Al mi ŝajnas, ke tio estas facila. Li estas egala al vi. Al mi oni ŝtelis la horloĝon (oni ŝtelis mian horloĝon). Al mi doloras dento. La birdo flugis al (kontraŭ) la fenestro. Akcepto al fremdlanda gasto. Dank' al lia helpo ni povis veni.

ANSTATAŬ — Mi venos anstataŭ vi. Li vizitis ŝin anstataŭ (viziti) ŝian fratinon. Ne servas larmo anstataŭ armo.

ANTAŬ — *Loko* — Li staras antaŭ la domo. Ŝi deklaris antaŭ ĉiuj sian pretecon labori. *Tempo* — Ni alveturis antaŭ du tagoj. Ili estis ĉe la stacidomo antaŭ la sesa horo. Ne laŭdu la tagon antaŭ la vespero.

APUD — Kiu sidis apud vi en la teatro? Apud la tablo. Apud la fenestro. Apud plena manĝotablo ĉiuj estas tre afabla.

ĈE — Ŝi loĝas ĉe siaj gepatroj. Ĉe ni estas gaje. Ĉe la tablo. Ĉe la antikvaj popoloj estis kutimo danci. Ĉe tiuj vortoj ŝi ekridis. Profesoro ĉe la universitato. Restu la tajloro ĉe sia laboro. Ĉe la forveturo li esprimis varman dankon. Ĉe tro ĝentila ekstero ofte mankas sincero.

ĈIRKAŬ — Ĉirkaŭ la domo estas ĝardeno. Ĉirkaŭ la mondo. La luno rondiras ĉirkaŭ la tero. Venos ĉirkaŭ (proksimume) kvindek personoj. Mi venos ĉirkaŭ (proksimume je) la kvina horo

DA — Kilogramo da pomoj. Glaso da vino. Multe da libroj: Dekoj da esperantistoj. Kiom da mono? Post iom da tempo.

DE — *Elira punkto* (forigo, depreno): Mi venas de via frato, Ili venas de (el) Parizo. Mi prenis la libron de la tablo. Prenu de li la kotizon. Prenu de lia kapo la ĉapelon. De mia frato li ricevis belan donacon. De mateno ĝis vespero. De tempo al tempo. *Aparteneco* (parto, aŭtoreco): Tio estas la jako de mia patro. Donu al mi la krajonon de via amiko. Kiu estas la nomo de via najbaro? Titolo de verko. Tegmento de domo. Peco de viando. La duono de la greno apartenas al lia filo. Ĉu vi ŝatas legi la poezion de Victor Hugo (legu: Viktor Jugo)? La dramoj de Shakespeare (legu: Ŝekspir). *Aganto*: La horloĝo de Petro donacita de (fare de) lia patro. La kostumo aĉetita de (fare de) mi de la magazeno de nia najbaro. La libro estas tradukita de mia filino (*Atentu la kazojn, kiam estas necese uzi fare de: La laboristo atendas plialtigon de la salajro fare de la mastro. Ofte tio ne estas necesa, ĉar la senco de la frazo estas klara ankaŭ uze nur de la prepozicio de: La romanoj de Dickens (legu: Dikens) estas legataj de multaj. Komenca momento: Ekde sia infaneco. Diferencigo: Diferenco de la argento disde la stano* (Diferenco inter argento kaj stano).

DUM — Dum (en la daŭro de) la tago. Dum (en) dormo. Dum dek tagoj (en daŭro de dek tagoj). Dum la leciono. Dum (ĉe) la legado. La aĉetito venas dum la manĝado (en la tempo de la manĝado, en la daŭro de la manĝado, paralele al, kun ĉe la manĝado). Li obstine subtenas sian aserton, dum ĉiuj ceteraj pensas la malon.

EKSTER — Ekster la ĉambro. Ekster la urbo. Ekster la lando. Ekster nia rondo. Tio estas ekster (super) mia povo (ekster mia eblo).

EL — Mi venas el la ĝardeno. Li venas el la vilaĝo. La pluvo falas el la nuboj. El la aero. Li tiras sian tukon el la poŝo. Traduko el la franca lingvo. Kio sekvas el tio? El tio ni povas konkludi, ke... Li kantas el tuta (plena) gorgo. Ringo el oro. Plej alta el (inter) ĉiuj. Ne gutas mielo el la ĉielo.

EN — En la lernejo. En nia lando. En mia korpo. En la aero. En liaj paroloj estas saĝo. En (dum) 1957 jaro. En la tago de la festo. En daŭro de tri horoj. En (dum) dormo. En sono. En embaraso. En bona humoro. En granda nombro. Romano en tri partoj. Dramo en kvin aktoj. En konversacio kun li. En konsento kun ĉiuj. Lando dividita en (je) tri regionoj.

ĜIS — Ni marŝos ĝis la vilaĝo. Li veturis de Sofio ĝis Tuluzo. De mateno ĝis vespero. Nur du semajnoj restas ĝis la kongreso. Atendu ĝis dimanĉo. Ĝis revido. Ĝis kiam vi silentos? De majesta ĝis ridinda estas nur unu paŝo.

INTFR — Inter la urbo kaj la vilaĝo. Li marŝas inter (meze de) ni ambaŭ. Inter du kolonoj. Inter kvar muroj. Inter vivo kaj morto. Elektu inter devo kaj intereso. Inter (en la medio de) la esperantistoj li rapide lernis paroli la internacian lingvon. Inter amikoj tiaj ŝercoj estas permesataj. Inter (el) ni ĉiuj li estas la plej inteligenta. Inter kvar okuloj.

JE — Je la kvina horo. Kaptu lin je la kolo. Ŝi kondukas la infanon je la mano. Malproksima je dek kilometroj (malproksima dek kilometrojn). Plena je (de) ŝtonoj. Riĉa je brutoj. Kontenta je (pri) la festo. Ŝi ludas je piano (ŝi ludas pianon).

KONTRAŬ — Li kuras kontraŭ la arbaro. Kontraŭ mi venas homo. Li staras kontraŭ la muro. Ili marŝas kontraŭ la vento. Ili parolas kontraŭ li. Ni estas kontraŭ la milito. Interŝanĝi varon kontraŭ varo. Li donis ŝafon kontraŭ (interŝanĝe je) porko. Kontraŭ mil frankoj vi povos ricevi la sekvantajn librojn. . . Ni povas liveri al vi tion kontraŭ (por) kvin levoj. Rimedo kontraŭ malsano. Gardu vin kontraŭ viaj malamikoj.

KROM — Krom li, venis ankaŭ lia fratino. Li ne parolas alian fremdan lingvon krom Esperanto. Krom mi, neniu en nia hejmo parolas esperante.

KUN — Ŝi marŝis kun (akompanate de) sia onklino. Mi sidis kun li en la ĉambro. Ĉu vi parolis kun ili? Mi iris kun fosilo. Mi prenos (kondukos) kun mi ankaŭ mian fraton. Li venas kun malplenaj manoj. Li renkontis miajn vortojn kun rido. Li aŭskultas kun atento. Estu ĝentila (afabla) kun ŝi. Ĉiu sezono kun sia bono.

LAŬ — Li marŝas laŭ (paralele al, paralele je) la fluo de la rivero. Iru laŭ tiu vojo. Agu laŭ (konforme al) la leĝoj. Mi agis laŭ mia konscienco. Faru tion laŭ la ekzemplo de la ceteraj. Mi venis laŭ lia ordono. Ĉiu laboras laŭ sia povo. Laŭ mia opinio. Laŭ mia scio. Tio ne estas laŭ mia gusto.

MALGRAŬ — Malgraŭ (malkonsidere al) la malbona vetero mi venos. Li faris tion malgraŭ mia volo. Malgraŭ ĉiuj malhelpoj kaj baroj. Malgraŭ (spite al) la ĝenerala opinio.

PER — Mi fosas per fosilo. Per kio li laboras? Per kio ŝi vivas? Mi skribas per krapono. Li venis per tramo. Ni sciigos tion al vi per letero. Li pagas per ĉeko. Kovri la glason per papero. Stopu la botelon per korka ŝtopilo. Li ludas per vortoj. Li tenas la pafilon per (en) mano. Per unu mano li kaptis lian manikon, per la alia li komencis frapi lin. Li prenis mian monon per forto (uze de forto, perforte). Per (de) kiu estos reprezentata via societo en la kongreso?

POR — Por kio (kiacele) vi venas? Por kiu vi venas? Ĉu por mi vi venas? Por kiu vi skribas tiun leteron? Mi portas por vi pomojn. Tio estas destinita por mi. Por skribado ni bezonas paperon. Ludo por plezuro. Tempo por tagmanĝo. Tempo por rikolto. Mi pagas abonon por mi kaj por mia amiko. Por mi tio estis surprizo. Por li tio estas bagatelo. Tion mi bezonas por la vintro. Por ĉiu tago li havas apartan kravaton. Kiom mi devas pagi por tio? Ni estas por la paco inter la nacioj. Unuj voĉdonis por la propono, aliaj kontraŭ ĝi. Kiu estas por kaj kiu kontraŭ? Mi prenos la libron nur por unu semajno. Ĝi povas resti ĉe vi por ĉiam. Por la mono pastra preĝo, por la mono romp' de leĝo.

POST — *Loko*: Li marŝas post (malantaŭ) mi. Post la domo estas granda ĝardeno. Post la arbaro estas rivero. *Tempo*: Post tri jaroj. Mi forlasis la kunvenon baldaŭ post li. Post la prelego okazis viglaj diskutoj. Iom post iom. Paŝo post paŝo. Post sufero venas prospero.

PRETER — Kiu pasas preter nia domo? Trafugis angelo preter la orelo.

PRI — Ni parolas pri la kongreso. Prf kio vi pensas? Pri kiu rilatas viaj vortoj? Deklaracio pri la esperantismo. Rakonto pri feinoj. Kantoj pri Rolando. Pri la lupo rakonto kaj la lupo renkonte.

PRO — Pro (kaŭze de) la pluvo mi ne povis veni. Pro (pri) kio vi koleras? (kio estas la kaŭzo aŭ kio estas la objekto de via kolero?). Pro kio vi malfruigis? Pro kio vi estas ĉagrenata? Pro guto post guto disfalas granito. Mi dankas pro via servo. Mi dankas pro la senditaj floroj. Morti pro (por) la ideo.

SEN — Li estas sen jako. Mi restis sen mono. Kial vi venas sen ŝi? Mi pasigis la nokton sen dormo. Li parolis tiujn vortojn sen entuziasmo. Sen ĝojo. Mi diris tion sen intenco ofendi kiun ajn. Ne venas honoro sen laboro. Pli bone (prefere) seka pano sen butero ol dolĉa kuko sen libero. Nuda kaj kruda, sen groŝo en poŝo.

SUB — La kato sidas sub la tablo. Sub la brakoli portas ian objekton. Ŝi marŝis sub pluvo. Paŝtisto sidas sub la arbo. Sub (en) la ombro de la arbo. Sub la ŝarĝo de la peza sako. Sub la ŝarĝo de la jaroj. Mi estas sub liaj ordonoj. Ĉu vi servis sub li (sub lia estreco)? Sub (en) tiuj vortoj kaŝas sin alia penso. Popolo sub jugo. Li deziras aperi sub (en, kun) formo de bonfaranto. Sub seruro promesojn tenu, sed doninte ne reprenu.


SUPER — La birdo flugas alte super la tero. Super niaj kapoj. Li laboras klinite super la libro. Tri jarojn mi laboris super tiu verko. Tio estas super miaj fortoj. Super (krom, ekster) tio li estas ankaŭ bona kantanto.

SUR — Sur la planko estas tapiŝo. Li ne portas ĉapelon sur sia kapo. Ili promenas sur la strato. Sur (en) kiu strato vi loĝas? Sur (en) kiu strato estas la poŝtejo? Sur ŝiaj lipoj aperis rideto. Sur (en) la horizonto aperas homaj siluetoj. Sur (ĉe, je) ĉiu paŝo vi renkontas esperantistojn.

TRA — Li pasis tra la kampo. Ŝi rapidas tra la strato. Tra la aero. Tra la mondo iras forta voko. Li rigardas tra la fenestro. Kial vi ne eniris tra la pordo? Miaj okuloj rapide kuris tra la teksto. Tra la granda bruo mi aŭdis ŝian voĉon. Rido tra larmoj. Tra liaj vortoj

oni povas kompreni lian intiman intencon. Tra (dum) la nokto. Tra la tuta jaro. Tra la libroj, tra la gazetoj. Pelu mizeron tra la pordo, ĝi revenos tra la fenestro.

TRANS — Trans (sur la alia bordo de) la rivero estas arbaro. Trans la monto. La amerika kontinento kuŝas trans la Oceano. Belaj rakontoj el trans la montoj.



NOTOJ

★ 1. *Inter* iuj prepozicioj estas pli aŭ malpli granda proksimeco laŭ signifo kaj en kelkaj kazoj (sed ne ĉiam) oni povas uzi egale unu aŭ la alian el ili:

APUD — ĈE: Apud (ĉe) la tablo (sed: ĉe ni — [ne: apud ni, en senco: en nia hejmo; ĉe tiuj vortoj — ne: apud tiuj vortoj]).

AL — KONTRAŬ: Kuri al (kontraŭ) la danĝera loko.

EN — DUM: En (dum) decembro. En (dum) dormo.

EL — INTER: Plej klera el (inter) ni.

EL — DE: Li venas el (de) la vilaĝo. Ŝtofo el (de) lano.

LAŬ — PRETER: Laŭ (preter) la rivero (laŭ = preter, sed samtempe paralele al la fluo de la akvo, ne kontraŭ ĝi).
ktp.

★ 2. *Post* la verbo danki oni uzas ordinare akuzativan komplementon: Mi dankas vin. Sed iuj — precipe la slavoj — uzas ankaŭ nerekta komplementon kun la prepozicio al: Mi dankas al vi (komparu: dank' al dio).

★ 3. *Post* la verbo simpatii kelkiuj uzas la prepozicion kun: ŝi simpatias kun li. Preferinde: ŝi simpatias al li (ŝia simpatio estas direktata al li).

★ 4. *Speciale pri*: POR, PRI, PRO.

Por — Destine al, en utilo, intereso de. . .

Pri — Kiel objekto de parolo, pensado, ktp.

Pro — Kaŭze de. . .

Por kiu vi zorgas? (kiu estas la celo, la destinato de viaj zorgoj?).

Pri kiu vi zorgas (kiu estas la objekto de viaj zorgoj?).

Pro kiu vi zorgas? (kiu kaŭzas ke vi havu zorgojn?).

Ŝi ploras { por sia frato (por lia utilo, por helpi, savi lin).

pri sia frato (li estas objekto de ŝia ploro).

pro sia frato (li estas la kaŭzo de ŝia ploro, li kaŭzis — per siaj agoj, sia konduto — ke ŝi ploru).



REZULTOJ DE LA DUA ETAPO DE LA ORGANIZA KONKURADO 1961/62

N ^o laŭ grado de plenumo	Loko kaj nomo de la societo	membroj	abonintoj	% plenumo
1	Stara Zagora — „Verda Stelo“	108	73	202,5
2	Dimitrovgrad — „Flamo“ (fabrika)	74	35	150,9
3	Burgas — „Nigra Maro“	136	81	137,9
4	Ruse — „Ponto de l'Amikeco“ (fervoĵista)	35	29	130,9
5	Jambol „Maksim Gorkij“	101	25	127,5
6	Tolbuhin „Paco“	44	34	123
7	v. Polski Trâmbeš (Târnovo) — „Progreso“	16	48	122,8
8	Samokov — „Rila Esperantisto“	51	14	120
9	Stanke Dimitrov — „Marek“	66	41	118,6
10	Levski — „Trumpetisto“	28	21	117,8
11	Sofio — „Vela Peeva“ (studenta)	60	7	117,5
12	v. Ljubimec — Ruĝa Stelo“	20	20	116,7
13	Vraca — „Sukceso“	79	46	113,8
14	Velingrad — „Stojo Kalpazanov“	31	22	107
15	Svilengrad — „Nova Mondo“	21	16	105,9
16	Plovdiv — „Kulturo“	265	162	100,7
17	Pârvomaj — „D-ro Zamenhof“	20	16	100
18	Sevlievo — „Fratiga Stelo“	55	22	97,9
19	Kjustendil — „Flamo“	48	22	96,7
20	Ĉirpan — „Mondamikeco“	20	14	96,7
21	Ĥarmanli — „Progreso“	25	3	93,2
22	Sofio — „Maksim Gorkij“	417	225	92,4
23	Ruse — „Dimitrovec“ (fabrika)	—	45	90
24	Pazargik — „Radio“	80	48	90
25	Vidin — „Espero“	21	15	86,1
26	Pleven — „Eterna Amikeco“	81	40	84
27	Asenovgrad — „David Sasonov“	80	36	82,8
28	Mezdra — „Vapcarov“	25	11	82,4
29	Dimitrovgrad — „Internacia Amikeco“	70	42	82
30	Pernik — „Nova Vojo“	24	16	80
31	Peŝtera — „Nova Epoko“	16	10	73,4
32	Trojan — „Balkana Stelo“	26	15	67,2
33	v. Borima (Loveĉ) — „Nova Mondo“	72	10	61,4

Organiza Fakoj de CK de BEA

(Daŭrigo de paĝo 12)

Por (pri) ĉio li estas la kulpas.

★ 5. La prepoziciojn oni povas uzi ankaŭ kiel prefiksojn: eniri, eldoni, deveni, alpaŝi, trapasi, preterlasi, interrompi, kontraŭmeti, perlabori, ktp.

★ 6. De la prepozicioj oni povas formi ankaŭ aliajn gramatikajn kategoriojn kaj ankaŭ formi novajn vortojn helpe de afiksoj: anstataŭi, apuda, ĉirkaŭi, ĉirkaŭe, ekstera, ekstere, kontraŭa, kontraŭdiri, kontraŭstari, kroma, pere, senpere, veri, posta, poste, suba, sube, supera, ktp.

FONDUSO „ESPERANTO-DOMO“ EN SOFIO

Responde al la alvoko de CK de BEA societoj kaj izolitaj esperantistoj sendis sumojn en Bulgaran Investan Bankon, Sofia, Filio 1, konto 10/76 por la fonduso „Konstruo de Esperanto-Domo“

Lazar Mladenov, Sofio,	300 lv.
Minko Conkovski, Sofia	10 lv.
Svilen Sokolov, „	5 lv.
Petja Ĉakova, „	7,2 lv.
Hristo Gorov, „	10 lv.
Vasil Ĉočov, „	13 lv.
Vladimir Popov, „	50 lv.
Vălčo Hristof, „	11 lv.
Cvetana Venkova, „	70 lv.
Nikola Kacarski „	5 lv.
Vladimir Manov,	10 lv.
Trajana Petkova,	9 lv.
Trjavna, la societo	25 lv.
Levski, „	40 lv.
Sevlievo, „	115 lv.
St. Dimitrov, „	8 lv.
vil. Bogdan „	6 lv.
Vraca „	67 lv.
Kostadin Kolev, Gabrovo	50 lv.
Elena Kovačeva „	38 lv.
Neno St. Janev „	5 lv.

El gutoj estas maro
la kosmo el atomoj;
el ĉies eta ŝparo
elkreskos Esperanto-domoj

K-do Lazar Mladenov el Sofio ĝis nun kolektis 360 lv. por fonduso „Konstruo de E-Domo“. Li okupas la unuan lokon en la tutlanda kampanjo. K-doĵ, sekvu la ekzemplon de la abnegacia laboro de Lazar Mladenov!



ĈU VI SCIAS TION?

Laŭ konstatoj de la Franca Akademio de la Sciencoj, oni parolas sur la tero 6760 lingvojn. Sole sur la Filipinoj (ĉirkaŭ 6000 insuloj) estas parolataj ĉirkaŭ 80 lingvoj. En Hindio oni parolas 800 lingvojn kaj dialektojn.

La angla lingvo havas ĉirkaŭ 450 000 vortojn, kaj la franca ĉirkaŭ 250 000. Sed por ĉiutaga babilado oni bezonas ne pli ol 500, por diskuti inter kleruloj ĝenerale sufiĉas 2000, kaj kiu posedas 8000 vortojn, povas plenumi la plej altajn pretendojn pri riĉeco de lingvaj esprimoj.

La nederlandaj doganistoj lastatempe komencis imiti la kantadon de la kardeloj. Tio estas necesa al ili pro la amasa kontrabandado de kardeloj al

Okcidenta Germanio, kie tiu kantanta varo lastatempe estas ege serĉata. Tuj kiam iu kaŝita en poŝo aŭ virina teko kardelo aŭdas la kantadon de la doganisto, ĝi respondas. Sed ankaŭ la kontrabandistoj trovis efikan kontraŭstaron. Ili komencis glui la bekojn de la birdoj.

Dum la sekvantaj 4—5 jaroj en Moskvo oni konstruos pli ol 100 tunelojn sub la stratoj. La tuneloj ebligas al la aŭtoj veturi sur la ĉefaj stratoj per rapideco ĝis 120 km po hore.

Lastatempe en Nederlando oni komencis produkti sekigitan lakton je pecoj. La pecoj rapide disfaliĝas en varma akvo.



JUNULARO SUR POSTENO

STUDENTA ESPERANTO-RONDO EN VARNA

Studentoj esperantistoj en la Supera ekonomia instituto en Varna, laŭ iniciato de k-do G. Dimov fondis la 28-an de novembro 1961 studentan E.-rondon „Studenta Amikeco“ ĉe la kultura klubo de la instituto. Dum la fondkunveno la studentojn salutis: G. Dimov en la nomo de CK de BEA, A. Kerkin en la nomo de la junulara grupo ĉe E.-societo „Albatro“ kaj d-rino J. Sirakova — kursgvidantino. Estis elektita sesmembra estraro kun prezidanto Nikola Pilev.

La agadplano de la rondo antaŭvidas utilajn iniciatojn; interalie, organizo de studentaj ekskursoj kaj brigadoj, interrilatoj kun studentoj-esperantistoj el eksterlando, organizo de esperantista vespero en la kultura klubo per materialoj, ricevitaj el eksterlando, ktp.

La adreso de la rondo estas: Studenta Esperanto-rondo „Studenta amikeco“ ĉe la Kultura klubo de la SUPERA EKONOMIA INSTITUTO „Dim. Blagoev“, VARNA.

Al niaj amikoj el Varna ni bondeziras daŭrajn sukcesojn.

STUDENTA ESPERANTISTA VIVO EN SOFIO

La 24-an de novembro en la kultura klubo de la universitato, la sofia studenta E.-societo „V. Peeva“ organizis propagandan amuzvesperon por la sofia studentaro. Ĉeestis pli ol 200 gejunuloj el la universitato kaj el aliaj ĉefurbaj altlernejoj. La altnivela programo de la vespero partoprenis B. Beleva, G. Kerezov kaj Mihail Kocov el la Bulg. E.-Teatro kaj la hungara esperantisto magiisto — A. Segedi.

En la salono estis aranĝita ekspozicio, respegulanta la internaciajn kontaktojn de la sofia E.-studentaro. Same oni disdonis abundan propagandan materialon, flugfolioj k. s.

En la universitato plensukcese finiĝis la porstudenta kurso, gvidata de V. Oljanov laŭ la rekta metodo. Ofte la kurson vizitis ankaŭ gestudentoj-malnovaj esperantistoj por kontakti kun la novaj gekamaradoj. Ricevis atestilojn 35 gekursanoj el entute partoprenintoj 42.

Fine de novembro okazis la jara kunveno de la studenta societo. La ĉeestantaj pli ol 30 gemembroj kaj novaj esperantistoj pridiskutis la unjaran agadon de la societo. Oni rimarkigis la neceson pri pli kolektiva agado de la estraro; la iniciatoj de la societo devas esti ĉiam antaŭe planitaj kaj bone diskonigitaj al la membraro. Oni same substrektis la nepran neceson pri pilargigo de la kontaktoj kun la komitatoj de la komsomolo en la altlernejoj.

Okaze de la jarkunveno la sofiaj studentoj ricevis gratuletojn de multaj eksterlandaj amikoj kaj funkcianoj de STELO. Oni legis leterojn de Moskvaj studentoj, de P. Ci-

liga—Parizo, C. Minnaja—Romo, U. J. Moritz—Münster, ka.

Por la estonta laborjaro la sofiaj studentoj planas multajn utilajn iniciatojn, interalie ankaŭ starigo de kontaktoj kun studentoj el afrikaj kaj aziaj landoj, kiuj studas en Sofio kaj eventuale organizi kurson por tiuj studentoj.

La novelektita estraro konsistas el: Al. Dimitrov, D. Ĉolakova, E. Keremidĉiev, P. Dinĉev kaj Ĉirpanliev.

BULGARA VESPERO EN POLA HAVENURBO ŜĈECIN

La 23-an de novembro 1961 okazis en Esperanto-klubo en pola havenurbo Ŝĉecin vespero, dediĉita al Bulgario. La lokaj gazetoj anoncis tiun ĉi vesperon, tial ĉeestis ĝin ne nur lokaj esperantistoj, sed ankaŭ aliaj urbaj civitanoj. Ankaŭ alvenis el Torun invitita de ni bulgara studento-esperantisto Gabriel Ivanov.

En senĝena atmosfero H. Grabovski prelegis pri Bulgario kaj Irena Tomaŝevska rakontis plenumore pri ŝia vizito en Bulgario kaj pri admirindaĵoj, malofte vidataj aliloke. Gabriel Ivanov deklamis poemon en bulgara lingvo, por ke li donu al la aŭskultantoj sonmodelon de bulgara lingvo kaj li respondis al la demandoj, starigitaj de la ĉeestantoj. Speciale li rakontis pri la Roza Valo, de kie li mem devenas kaj pri la Esperanto-movado en Bulgario. La vesperon kompletigis deklamo de la poemo „Ĉu li?“; verkita originale en Esperanto de Canko Murgin. En la fino de la programo estis prezentitaj modeloj de belaj bulgaraj kantoj per gramofono.

Ĝis malfrua noktoboroj daŭris la agrabla vespero. En la klubo estis aranĝita ekspozicio de fotografiaĵoj pri la vivo de la bulgara popolo kaj de esperantaj libroj, gazetoj kaj prospektoj, eldonitaj dum la lastaj jaroj en Bulgario.

S. Palica

En ĵurnalo „**Naroden Drugar**“ (Kamarado del Popolo) en Jambol (27. IX. 1956) konekse kun la esperanta propaganda semajno (25. IX—1. X. 1961) aperis interesa artikolo „Esperanto en la servo de la paco“ de Dimo Trudoljubov, prezidanto de la Esperantista Societo „Maksim Gorkij“ en Jambol. En la sama ĵurnalo (7. X. 1961) — artikolo-informo de P. Dimitrova pri la kunveno en Jambol dediĉita al la germana problemo.

En ĵurnalo „**Literaturni Novini**“ (Literaturaj Novaĵoj) en Sofio (27. IX. 1961) — recenzo de S. Vladimirov „Valora lernhelpilo por la bulgaraj esperantistoj“ (kritikaj notoj pri la aperinta antaŭ nelonge granda Bulgara-esperanta vortaro).

En ĵurnalo „**Haskovska Tribuna**“ (21. X. 1961) — longa artikolo „Fenestro al la mondo“ de Maria Uzunova kaj Boris Kolev, en kiu la aŭtoroj tre lerte uzis diversajn propagandajn materialojn.

En ĵurnalo „**Narodno Delo**“ (Popola Afero) en Varna (20. X. 1961) en la kroniko — sciigo pri malfermata nova Esperanto-kurso por komencantoj.

En ĵurnalo „**Stopanoved**“ (Ekonomiisto) en Varna (8. XI. 1961) en la kroniko — sciigo pri nova malfermata kurso en la Universitato gvidota laŭ la rekta metodo de Georgi Dimov.

En ĵurnalo „**Oteĉestven Zov**“ (Patrolanda Alvoko) en Vraca (21. XI. 1961) en speciala rubriko „Fenestro al la mondo“ oni publikigis du esperantajn leterojn el Nepalo kaj Japanio.

PAROLO DE LA REDAKCIO

Laŭ decido de CK de BEA la redakcio de la asocia organo „**Bulgara Esperantisto**“ estas reorganizita. Ĉefredaktoro estas nomita la asocia sekretario Violin Oljanov. La sama prizorgas la lingvajn demandojn kaj la recenzojn. La belartajn materialojn prizorgas Atanas Lakov, Ĉanko Murgin estas anstataŭanto de la ĉefredaktoro kaj prizorgas la internaciajn informojn, Ivan Sarafov — la historiajn kaj la sociajn materialojn, Kiril Draĵev — la teknikan redaktadon, la humorajojn kaj la distraĵojn, Simeon Simeonov — la organizaĵajn materialojn kaj la rubrikon „Junularo sur posteno“. La reorganizita redakta komitato daŭrigos la strebon por plibonigo de la gazeto, varigante la materialojn, plifortigante la informojn pri la internacia E-movado, enkondukante novajn rubrikojn, materialojn por la novaj esperantistoj, distraĵojn ktp. Sed ni denove atentigas, ke por la plibonigo plej bone efikas la abunda sendado de materialoj fare de la esperantistoj de la tuta lando. Ni memorigas al la estraroj nomi korespondantojn de BE kaj kontroli, ĉu tiuj regule plenumas siajn funkciojn. Ĉiam post pridiskuto de la ĉefartikolo kaj de aliaj gravaj materialoj la societoj sendu korespondaĵojn pri la sekvintaj tion decidoj.

Ni alarmas al la societoj, ke la aboniga kampanjo tiun ĉi jaron marŝas tre malbone. La estraroj denove pridiskutu la demandon kaj plifortigu la abonigadon! Alimaniere ni ne povos plenumi la programon por plibonigado kaj regula aperado.

La societoj devas daŭrigi la abonigadon al „Bulgara Esperantisto“! Eĉ unu membro ne restu sen „Bulgara Esperantisto“!

USSR

Genadij L. Turkov, str. Zaparina 90-a, k. 3
Iĥabarovsk — interŝ. pm kun ĉi en E., rusa
angla, hispana. Respondo garantiita.

Vello Ritso (28-jara), Koidula 13—5, **Tal-**
linn 10, Estonio — kun ĉi en E., angla, rusa
pri ĉi.

Algirdas Gasiunas, Iki pareikalavimo (Poste
Restante), **Kaunas 2**, Litova SSR — interŝ.
Pl de naturvidaĵoj, monumentoj kaj historiaj
konstruaĵoj.

Antanas Juškaitis, Kaniuku km., **Raudon-**
dvario paštas, Kauno r-nas, Litova SSR —
pri metodoj pri adapto de la abela lakteto en
la medicino kaj ĝia kuraca efiko sur la orga-
nismoj.

Jurij Tisĉenko, Podemnaja 11, **Novoros-**
sijsk 3 — kun ĉi; Pm., Pl.

Jaan Arjak (instruisto, 29-jara), Valga 39,
Torva, Estona SSR — kun ĉi pri ĉi; Pl (artaj
reproduktaĵoj, pejzaĝoj, popolaj kostumoj),
artalbumoj, muziknotoj, gramofondiskoj.

Leonid Romenskij (studento de biologio),
ul. Artema 49, **Ĥarkov 23** — kun ĉi pri spor-
toj kaj filmoj; Pl. PM, fotoj, fotoj de aktoroj.

Lida Antipina (studentino, 17-jara),
ul. Alekseevskaja 18, kv. 2, **Ĥarkov 51** — kun
ĉi per P, Pl, L.; gramofondiskoj, amatoraj fo-
toj, fotoj de artistoj.

Alo Leis (studento de filologio), O. Lutsu
str. 19—7, **Tartu**, Estona SSR — kun ĉi pri ĉi.

A. Rejs (instruisto de fremdaj lingvoj),
Gramzda, Liepajas raj., Latva SSR — kun ĉi
pri literaturo, lingvistiko ka.; libroj, PM ka.

Aleksandr Denisov (studento, 20-jara),
Svetlogorskaja 10/45, **Kiev 65** — kun ĉi pri
libroj, sporto; Pl, PM.

Jurij Tolmaĉev (konstrukciisto, 24-jara), 3
Novij 3, Severnij Taganrog — kun ĉi pri kul-
tura vivo, turismo, muziko; PM, Pl.

Rondo „Esperanto“, Pionir-Domo, s. Varna,
Ĉeljabinskaja obl. organizas sian unuan leter-
vesperon.

Vello Ritso (28-jara), Koidula 13—5, **Tal-**
linn 10, Estona SSR — kun ĉi pri ĉi.

ĈEĤOSLOVAKIO

M. Janaĉkova, Sokoľovska 326, Nurany,
Pilzen — kun Bulgario, Pl.

HUNGARIO

Kvardek 16—22-jaraj gejunuloj organizis
la unuan hungaran studentan E-klubon en
Budapeŝto. Ni petas informi per tio vian le-
gantaron, gekonataron, kolegaron, anaron.
Korespondado kaj interŝanĝo pri ĉ. t. Certa
respondo. Esperanto-Klubo Studenta (EKS) de
la Fakrondo „Konkordo“, **Budapest II**, Koletj
Karoly u. 22.

BULGARIO

Grigor Ĵeljavski, str. Republika. rab. ĵil.,
blok 6, **Sofio 20** — pri div. t., interŝ. E-lib-
rojn, il. gaz., ĵurnalojn, fotojn kaj bildojn
kun laboristoj, vilaĝanoj, verkistoj, ĵurnalistoj
el ĉ. l. de Azio, Afriko, Aŭstralio, Sud-Ame-
riko.

Ĉefredaktoro: Violin OLJANOV

Redakta komitato: Kiril DRAĴEV, Atanas LAKOV, Canko MURGIN (vicĉefredaktoro),
Ivan SARAFOV, Simeon SIMEONOV.

Korektis: P. Ĉ. Georgieva

Formato 71 × 100/16

Eldonkvanto 3000 ekz.

Adreso: Bulv. Dondukov 57, Tel. 7-46-01, Sofio, Poŝtkesto 66

Ŝtata presejo „T. Dimitrov“, filio 2 — Sofia; mendo № 7476/61

Ĉu?

Ĉu vi abonigis viajn korespondantojn al „Bulgara Esperantisto“? Per ĝi vi plej facile kaj plej aŭtoritate kaj komplete konigos al ili la bulgaran Esperanto-movadon, ĝian interesan historion kaj nunan aktivecon, per ĝi ili povus ĝui la bulgaran literaturon. Ne prokrastu! Tuj abonigu ilin!

Ĉu vi abonigis vian amikon? Oni mezuras la kulturon de ĉiu ajn movado per la disvastigo de ĝia presorgano. Nia asocio devas fieri per siaj membroj, kleraj kaj bone konantaj sian movadon. En tio helpas al ili „Bulgara Esperantisto“. Ne prokrastu! Tuj abonigu vian amikon!

Estraranoj! Ĉu vi faris ĉion eblan por abonigi la tutan anaron? Ju pli da abonintoj vi havas, des pli forta estas via societo. Se ĉiuj estraroj bone komprenus tiun simplan veron, ni havus fortan asocion kun interesa kaj stabila presorgano. Ne prokrastu! Daŭrigu la kampanjon por varbado de novaj abonantoj!

Kursgvidantoj! „Bulgara Esperantisto“ regule disponigas perfektigan lingvan materialon por novaj esperantistoj. Abonigu viajn gekursanojn!

Jarabono: 1,4 lv. por eksterlando — 2 lv., 2 dolaroj,
2 rubloj.

Por Albanio, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio — 1,8 lv.

Abonigu! Ne prokrastu! Abonigu!

Bulgara Esperantista Asocio

a b o n i g a s

al la interesa gazeto de la Mondpaca Esperantista Movado

„Paco“

Jarabono 1,2 lv.

Adreso: p. k. 66, Sofia